



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 12-an de Septembro 2022

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel;  
zome: Mikaelo Lineckij, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

*ELI esprimas siajn bondezirojn al la JELI-ano Ariel Schwartz okaze de lia geedziĝo kun Tammy Brill!*

*ELI bonvenigas la berlinanon Eran Levi kiu vizitas Israelon.*

*Protokolo de la pasinta (julia) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

### 1. Raportoj

- a) **Jehoŝua**: en la lastaj n-roj de IE la adreso de ELI estas la malnova poŝtkesto. **Mikaelo**: mi jam korektis.
- b) **Jehoŝua**: en la lasta n-ro de IE malgraŭ mencio ne aperis la foto de la atestilo pri Lidia Zamenhof!
- c) **Amri**: pakaĵo kun ĉ. 100 surgluitaj kovertoj, kaj etiketoj por la ceteraj adresoj de IE, kiun sendis Mikaelo per 24-hora alsendo vagadas en la poŝto jam du semajnojn. Mikaelo havas nur la kvitancon pri 15 sikloj, eĉ ne la sekveblan registro-numeron. [Intertempe ĝi alvenis; evidente pro miskompreno ĝi estis nek registrita nek 24-hora!].
- ĉ) **Amri**: 5 israelanoj aliĝis al la 107-a UK en Montrealo, sed fine ĉeestis nur 2. Amri salutis nome de MONA kaj eĉ menciis la IK-on. La kunveno de MONA estis nur virtuala, partoprenis ĉ. 13, ĉefe irananoj (ili ne ricevis vizojn al Kanado).
- d) **Dror** aldonis *deklaron pri alireblo* (הצהרת נגישות) al nia retejo.
- e) **Jehoŝua**: malgraŭ la klopodoj neniu konfirmis telefone sian ĉeeston (aŭ la malon) en la kunsido. **Gabi**: ebligu elekton inter telefonado kaj *regula* telefon-mesaĝo. Kelkaj ne volas aŭ havas la eblecon paroli, sed mallonge skribi ili povas eĉ dum veturado.
- f) **Jehoŝua**: la kutima **SOMER** fina Renkontiĝo estis sukcesa. Pro mia insisto pri devontiĝo partoprenis entute 13 homoj, inkl. la s.m. Eran k Ariel. *ELI gratulas al Jehoŝua por liaj klopodoj, kiuj kondukis al sukceso!*

### 2. La estonto de niaj Landaj Kunvenoj (Amri, Jehoŝua)

Lastatempe partoprenas tre malmultaj membroj (ili ne konfirmas anticipe; en Julio estis nur 12, kaj nur 4 restis ĝis la fino). La demando: kiel kunvenigi por la Zamenhofa Vespero? Kaj kie – se estos tiom malmultaj, ĉu tamen kiel pasintfoje? (*pritrakto daŭrigota...*)

### 3. Horŝanĝo de niaj Kunsidoj kaj Klubkunvenoj (Ŝlomo)

**Ŝlomo** proponas komenci la Estrarkunsidojn je la 19h30 anstataŭ la 20h00 (sekve plifruigi la klubon). **Jehoŝua**: ne ĉiuj estas pensiuloj, ili laboras. **Ŝlomo**: do ni sondu la opinion de la membraro, ĉu komenci duonhoron pli frue?

2/...



#### 4. Luigo de la oficejo (Ŝlomo, Amri)

**Ŝlomo:** ni devas pagi VAT. Ĉu malfermi dosieron? **Eran:** eblas pagi unufoje en ĉiuj 4 monatoj. **Amri:** Lior Hass ege klopodis (li ja estas interesito!) kaj trovis 2 kandidatojn – ili pluiris, ĉar ni ne reagis sufiĉe rapide. Kiam aperos plia kandidato, ni devas esti pretaj kaj tuj subskribi kontrakton! Ne estu faktoroj, kiuj povus fortimigi potencialajn luantojn (kiel ekzemple ke **ili** devu intertrakti kun VAT), nek tiri la tempon vane. **Decido:** Ŝlomo interkonsiliĝu kun nia kontisto kaj kun Lior, kio estas la plej taŭga vojo por ni koncerne VAT.

#### 5. Plialtigo de la Dratvereja lupago (Amri)

La kontrakto estis subskribita, kaj post kompromiso ilia lupago estas ĉi-jare iomete pli alta – 3,400 NIS. **Jehoŝua** partoprenos postmorgaŭ (la 14.9) la kunvenon de la loĝantoj de la Ĥelmit-projekto kun la adv. Omid kaj la urbaj respondeculoj en Bat-Jam.

#### 6. La venontjara IK (Amri)

Estas proponoj pri la Nordo. Ĉar pro personaj kialoj Nava Bilicki petis ne plu respondeci pri la loĝigo (ELI dankas ŝin pro la ĝisnuna laboro), Amri esploros la eblecojn kaj kondiĉojn en Tiberiado kaj Nazareto.

**La venonta kunsido:** lunde, la 3-an de Oktobro 2022, je la 20:00  
(en Alon-Turo-2, hibride)

*Protokolis: Gabi Zeevi*